

19.12.1934

### La centjara datreveno de nia nacia himno.

D-ro H. Traub.

Post la batalo sur Bílá hora - Blanka monto en la jaro 1620 atingis la humiligo kaj subpremo de la ĉeĥa popolo sian fundon. Al nova vivo ĝi vekigis iom post iom nur de post la jaro 1781, en kiu jaro Jozefo la II-a eldonis siajn du famajn ordonojn. La unua ordono, kiu nuligis la servutecon, levis la kamparanon al nivelo de vera homo, permesante al li libere edziĝi kaj transloĝiĝi, liaj infanoj povis en la urbo studi aŭ lerni metion. La dua, neniom malpli grava ordono, kiu leĝigis la religian toleremon, ebligis al la ĝis nun persekutitaj nekatolikoj la aliĝon al unu el la du permesitaj protestantaj konfesioj. Tiuj ĉi du ordonoj faris la simplan kamparanon pli memfida, pli rezistema. Sed la burĝaro fariĝis en ĉiam pli granda amplekso la viktimo de germanigo, malkaŝe kaj sisteme praktikita de post la surtroniĝo de Jozefo la II-a. De la Granda franca revolucio heredis la 19-a jarcento la brilan devizon pri libereco, egaleco kaj frateco, devizo, kiu ankoraŭ atendis sian iom-post-ioman realigon. La ĉeĥan renaskiĝon akcelis ankaŭ la Napoleonaj militoj, dum kiuj venis Bohemion ruspola soldataro, kiu frate interrilatis kun la enlanda loĝantaro.

Forte efikis certe ankaŭ la impona nacia revekigo en la dispecigita najbara Germanujo, kies eĥo ne povis resti sen influo al la timigitaj ĉeĥoj. Plue, estis senlima feliĉo por la popolo, ke troviĝis inter ĝiaj malmultaj reprezentantoj kelkaj ardaĵ entuziasmuloj, kiuj la popolon fervore vekadis kaj edukadis al nacia konscio.

La izolitan branĉon de nia popolo reprezentis la slovakaj poetoj Kollár kaj Šafařík, bone konataj en la tuta slava mondo. La ĉeĥan branĉon reprezentis la scienculoj Dobrovský, Jungmann kaj Palacký, el la poetoj speciale nominda estas Čelakovský. Jungmann eldiris la simplan veron, ke nek vortoj nek kredo sufiĉas, por ke popolo vekigu kaj renaskigu al nova vivo, sed ke necesas laboro, laboro per ĉiuj fortoj kaj rimedoj.

Nova epoko en la vivo de nia popolo komenciĝis per la fondo de la Nacia Muzeo en la jaro 1818. Ĝi fariĝis la centro kaj fokuso de scienca kaj per tio porpopola laboro. Kaj kiam atingis nian patrujon la ondoj de la Franca julia revolucio en la jaro 1830, kaj precipe de la Pola nacia ribelo unu jaron pli poste, ili influis en alta grado la reprezentantojn kaj vekantojn de la ĉeĥa popolo.

Inter tiuj, kiuj konsciencie klopodis pri la konsciigo de la popolo, estis ankaŭ la dramverkistoj, kiuj alparolis la popolon en lingvo festotaga. Honoran lokon okupas inter ili Josef Kajetán Tyl, kiu venis en la jaro 1828 de Kutná Hora al Praha. Tie ĉi li intencis daŭrigi sian studadon, sed baldaŭ forlasinte ĝin, pelata de interna pasio, li fariĝis aktoro. Kvankam li poste fariĝis oficisto, - en la jaro 1831- kaj tre lerte gvidis de post la jaro 1834 la gazeton "České květy" - "Ĉeĥaj floroj", tamen la amo al teatro lin neniam forlasis.

Ankaŭ libroj havas sian sorton, diras malnova proverbo. La samo validas pri teatraĵoj. Tyl skribis iom post iom imponan vicon da teatraĵoj. Kaj jen, unu el la malplej valoraj faris lin senmorta, ĝuste tiu ĉi kortuŝis kaj entuziasmigis la publikon . . . ne hazarde kaj por momenta ekflamiĝo, sed por ĉiam. Tyl sukcesis ne nur amuzi kaj morale levi sian aŭskultantaron, sed ankaŭ fortigi ĝian nacian konscion kaj lastvice sed neniel lastmerite, li forte akcelis la evoluon de la gepatra lingvo, kiu estis peke malzorgata dum jarcentoj.

Je la memorinda dimanĉo, la 21-an de decembro en la jaro 1834, do antaŭ cent jaroj, okazis la unua prezentado de la senpretenda komedio "Fidlovačka". Kio en tiu ĉi teatraĵo precipe efikis kaj ekflamigis la korojn de la publiko, estis de blinda violonisto kantata kanto, naskiĝinta el la sufoka atmosfero de tiu tempo, kiu suferis sub la senindulga politika premo de l' absolutismo de Metternich.

Tyl verkis la simplajn, sentplenajn vortojn - el koro ili venis kaj korojn ili iris - kaj František Škroup, teatra muzikestro, komponis la melodion. Tiu ĉi kanto efikis tiel forte, ke unu el la plej eminentaj ĉeĥaj poetoj Svatopluk Čech nomis la kanton "Kde domov můj - Kie mia hejm" la "najtingala kanto de l'nova popola printempo". La simpla kanto - la 19-a muzikverko el 21- certigis ankaŭ al Škroup nomon senmortan, kvankam liaj verkoj havas pli altan artnivelon. En

Rotterdam, Nederlando, oni inaŭguris al li antaŭ kelkaj tagoj memortabulon sur la domo, en kiu li mortis.

Estas vere kortuŝe, se ni sciiĝas, ke ne estis nur la unuaj aŭskultantoj de Fidlovačka, kiujn emociigis la sentplena kanto "Kde domov můj - Kie mia hejm". La agrabla kaj fortega baso de l'kantisto Karel Strakatý ekkaptis ĉiun kie ajn en la provinco li ĝin kantis. Ĝi estas kanto nebatalema, pli ĝuste melankolia, ĝi tuŝas la koron kiel dolĉa ebrio per la beleco de l'patrujo kaj hejmo. La kanto disvastiĝis mirinde rapide, kiel klare pruvas la moravia kaj slovaka variantoj.

Kio do enestas la kanton, kiu vere elektris kaj efikis per tiel magneta sorĉo? Ni devas resenti la tiaman malgajan tempon, kiam la popolo ĝojis jam pro tio, ke ĝi posedas almenaŭ la terbulon, kiu fariĝis por ĝi la plej kara, la plej sankta simbolo. Same kiel la franca revolucia marseljezo, ekfontis ankaŭ nia nacia himno el la animo, ŝarĝita per zorgoj pri la vivo de l'popolo kaj ĝia patrujo. Eble plej emociigas, kiel tiu ĉi simpla, senpretenda kaj mola kanto enradikiĝis kiel manifesto de vera, konscia ĉeĥeco; kiel ĝi dolĉe sonis al oreloj de l'ĉeĥoslovakaj revoluciuloj dum la mondmilito, kiuj, la kanton surlipe, iris batalon por la libereco de sia tiom sortbatita kaj malproksima patrujo.

La kanto de la blinda violonisto, okupinte tiel unike la koron de ĉiu ĉeĥo, fariĝis per unu fojo amata kanto tutnacia. Kion sentus ĝiaj ambaŭ kreintoj sciiĝante, ke ĝi, kune kun la nacia slovaka kanto, estis post la ŝtata renverso prave akceptita kaj proklamita kiel ŝtata himno de liberiĝinta kaj unuiginta popolo?

Tradukis  
Th. Kilian.